- **JEFO** = Junulara Esperantista Franca Organizo : organisation des jeunes espérantophones français. JEFO est affiliée à la fois à TEJO comme «section nationale» et à UFE comme «section jeunes». L'adhésion s'entend pour 1 an, soit 4 numéros de la revue.

- **TEJO** = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo : organisation mondiale des jeunes espérantophones, affiliée à UEA comme «section jeune».

- **UFE** = Union Française pour l'Espéranto ou Espéranto-France, affiliée à UEA comme «section nationale»

- **UEA** = Universala Esperanto Asocio : association mondiale pour l'espéranto

- **Pasporta Servo** : guide d'adresses pour être hébergé gratuitement dans le monde entier lors de voyages à l'étranger, édité par TEJO.

- **Jarlibro** : guide mondial de tous les délégués d'associations ou clubs locaux d'espérantophones, édité par UEA.

- Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans, mais ne disposent pas du droit de vote à l'assemblée générale.

- Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.

- L'adhésion est valable pour 4 trimestres, à compter de la date d'adhésion. Vous recevrez les numéros de *JeunEsperanto Info* et *Konkize* à paraître après votre date d'adhésion.

- Si vous souhaitez que vos coordonnées restent confidentielles, cochez la case suivante : ☐

Chèque postal, bancaire ou mandat lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre à ce bulletin d'adhésion à : **J.E.F.O. 4 bis, rue de la Cerisaie F-75004 PARIS**

Deux nouveaux disques de chanteurs français espérantophones**JoMo+Libertarios****J. YVART chante Brassens**

Viennent de paraître les deux premiers CDs de notre nouvelle collection **Kolekto 2000**, lancée au Printemps 1998 et qui prendra fin en 2000 ou 2002.

Notre but est de faire paraître durant cette période une série d'au moins 10 CDs de 6 à 8 titres de différents groupes et artistes chantant dans la langue internationale espéranto.

Les deux premiers CDs de la collection présentent deux artistes français :

- **JoMo kaj Liberecanoj** (JoMo; Jean Marc Leclercq chanteur Rock n'roll, ex-membre des Rosemary's babies est par ailleurs inscrit au Guinness des records 1999 pour des chansons interprétées en 22 langues dont l'espéranto).

- **Jacques YVART**, dont **Georges Brassens** était le parrain artistique et ami (filleul spirituel).

Tous deux ont été officiellement présentés durant le 83ème Congrès Mondial d'Espéranto à Montpellier du 1er au 4 Août 98, à l'occasion de leur concert devant un public de 66 pays.

Avec la **Kolekto 2000**, **VINILKOSMO**, le label d'**EUROKKA** veut mettre en relief la vie culturelle de l'espéranto en général et de sa musique en particulier, aussi bien aux espérantophones qu'aux non espérantophones du monde entier.

Kolekto 2000 montre et montrera que la culture musicale de l'espéranto est riche, diversifiée, et de qualité; qu'elle n'a rien à envier à quelque culture musicale nationale que ce soit.

Notre initiative s'inscrit dans le cadre de la **Kampanjo 2000**, campagne lancée par l'Association Mondiale d'Espéranto pour fêter l'an 2000. C'est aussi l'occasion de marquer le coup pour le 10ème anniversaire d'**EUROKKA**.

Toute personne ou organisation désireuse de souscrire à **Kolekto 2000** en totalité peut nous la commander, pour 600F + 200F de frais de port.

Mais il est possible aussi de commander seulement un ou plusieurs CDs de la collection pour 79F + 20F de frais de port.

Le catalogue de **VINILKOSMO** est disponible sur simple demande et le magazine **Rok-gazet'** par abonnement (100F pour 4 numéros).

Pour tous renseignements complémentaires, contacter **VINILKOSMO**.

EUROKKA

Esperanto-Rok-Asocio

FR-31450 Donneville

France

Tél/fax : 05 61 81 95 65

E-mail : eurokka@club-internet.fr



- EUROKKA - VINILKOSMO

ROK-gazet'

Esperanto-Rok-Asocio
FR-31450 Donneville
Francio

Tel/Faks : +33 5 61 81 95 65

eurokka@club-internet.fr

Komuniko

Temo : *Kolekto 2000*

Estimataj, saluton,

Okaze de la 10-jariĝo de **EUROKKA** kaj kunlaborado kadre de *Kampanjo 2000*, **VINILKOSMO** (la diskeldonejo de **EUROKKA**) prezentas *Kolekto 2000*-on.

La du unuaj KD-oj kiuj faras parton de kompaktdiska kolekto kiu startis de Majo 1998 kaj daŭros ĝis jaro 2000 aŭ 2002 ĵus aperis.

La celo estas aperigi dum tiu periodo serion de minimume dek 6 ĝis 8-titolaj

KD-oj el diversaj Espoartistoj.

La du unuaj KD-oj de la kolekto oficiale prezentigis por la 83a Universala Kongreso en Montpellier okaze de la koncertoj de "Jacques Yvart" kaj de "JoMo" (bedaŭrinde pro pluvo la koncerto en kiu JoMo devis prezenti la KD-on estis nuligita!).

Pere de *Kolekto 2000* **EUROKKA** volas substreki ke vivanta Esperantokulturo kiel muziko estas unu el la plej gravaj elmentoj de ekzisto kaj realo de Esperanto por kaj espistoj kaj neespistoj.

Kolekto 2000 ankaŭ pravas ke esperantomuzikkulturo estas tre diversa,

riĉenhava, kvalita kaj valora, samekiel kiu ajn alia nacimuzika kulturo.

Esperantistoj uzu, disvastigu, disaŭdigu ĝin por varbi por esperanto kaj por memkulturigi.

Por tion fari petu de **EUROKKA**, *Vinilkosmo-katalogon* kun mendilo,

Rok-gazet'-abononilon, ktp... La subteno de tiu agado multobligos ĝiajn efektojn.

La KD de **JoMo** iom malfruis, ĝi enhavas 8 titolojn de pure rokenrola muziko kun liberecanaj tekstoj (pri ukraina kaj hispana revolucioj kaj pli aktualaj sociaj temoj).

La KD de **Jak Yvart** enhavas 6 tradukitajn kanzonojn de la fama franca kantisto **Georges Brassens**. Efektive **Jacques Yvart** siatempe amikiĝis kun **Georges Brassens** kaj Jacques dediĉas tiun diskon al la granda majstro.

La rezulto estas tute profesikvalita.

Nun eblas antaŭmendi la sekvantajn KD-ojn unu post aliaj laŭ la ritmproduktado por 69FrF + sendokostoj.

Eblas ankaŭ aboni la tutan kolekton por 600FrF + Sendokostoj (vidu tariftabelon ĉi aldone).

Sed eblas mendi la KD-ojn post apero por 79FrF + sendokostoj, same kiel ĉi du unuaj.

Ni ankoraŭ ne decidis kiu estos la sekva, pluraj artistoj /bandoj sin proponis (Persone, La Kompanoj, Kajto, Solotronik, La Mevo, Jomart & nataŝa, ktp...) kaj post monato ni estos fiksitaj (sed tre verŝajne temos pri **PERSONE** el Stockholm).

Ni antaŭdankas vin pro la diskonigo de tiu informo.

Plej roke vin salutas la respondeculo de **EUROKKA**

Floréal Martorell


PS : *Vinilkosmo-kompil' Vol. 2* ankoraŭ disponeblas, la unua volumo KD-forme estas preskaŭ entute elĉerpita sed restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de kasedoj.

Ne hezitu peti de ni la katalogon de ĉiuj disponeblaj produktaĵoj (kasedoj kaj KD-oj). Ni ankaŭ laboras pri la pretigo de la 9a *Rok-gazet'* sed ĝi ne pretos antaŭ Novembro 1998 pro troa laboro (aperigo de la KD-oj de *Kolekto 2000* kaj preparoj por la artaj spektakloj de UK en Montpellier kiu estas aparte riĉenhavaj).

Saluton,

Nu jes, eble vi aŭdis onidiraĵojn pri tio, nun mi jam konfirmas:

Restas TRE MALMULTAJ liberaj lokoj !!



Kaj multaj ankoraŭ ne aliĝis !

Ne ekploru, ni trovos solvon !

- > Eblos liberigi kelkajn litojn ĉar kelkaj povos tranokti en Strasburgo;
- > Eblos partigi sian liton kun koleg(in)o ! ☺
- > Eblos dormigi duonon de la partoprenantoj dumtage, duonon dumnokte; ☺
- > ktp...

Do, vi vidas, finfine povas aliĝi ankoraŭ senprobleme 20 personoj !! ☺

Serioze, ne hezitu aliĝi ankoraŭ; inter la lastaj aliĝint/-ontoj ni "elektos" laŭ:

- 1) aktiva partopreno al la programo / organizo;
- 2) loĝantoj en la regiono "Alzaco-Loreno" havos prioritaton;
- 3) "novuloj" kiuj ankoraŭ ne partoprenis gastronomiajn renkontiĝojn havos prioritaton;
- 4) junuloj sub la 30a jaraĝo havos prioritaton.

Bv. noti, ke ĉar momente Francianoj estas minoritataj (jes !!!), ili ne havos malprioritaton kontraŭ eksterlandanoj.

Do, reagu rapide kaj sendu al mi viajn aliĝilojn !!!

Ĝis,

Magali

Magali Texier
Komitatanino de Jefe,
Ĉef-organizantino de la Saŭrkraŭta Semajnfino

Hafenstr. 39/301
DE-68159 Mannheim
Germanio

tel: +49/ 621/ 10 68 62
faks: 49/ 621/ 1 37 39
retadreso: MTexier@esperanto.org

Aliĝilo al la SAŬRKRAŬTA Semajnfino



Familia nomo : _____ Persona nomo : _____

Adreso : _____

_____ Lando : _____

Nask. : _____ () ina () malina Telefono : _____

Telefakso : _____ Retadreso : _____

- () mi estas vegetaran-in-o
- () baza kotizo (studento, senlaborulo...) 180 Ffr
- () baza kotizo (laborulo) 230 Ffr
- () se vi aliĝas post la 1a de septembro, aldonu 50 Ffr
- () se vi estas pli ol 30-jara, aldonu 50 Ffr
- () se vi loĝas ekster Francio (francoj aŭ ne), duonpreze de ĉi-supra kotizo !

Dato : _____

Subskribo : _____

SUMO : _____

SAŬRKRAŬTA

kaj **KIŜA** *Semajnfino*

2-4 oktobro 98 • Diebolsheim • Elzaco

G EJ kaj JEFO kunorganizas la unuan franc-germanan gastronomian semajnfino. Estas tre modesta kromĉefiko de la kunlaborado kadre de OKEJ sed tiam ni rekte ĝuos la fruktojn de niaj strebadoj. Elzaco estas aparte

grava regiono. Ĝi estis preteksto por pluraj militoj kaj nun ĝi iĝas preteksto por amikiĝo.

De la 2a ĝis la 4a de oktobro 1998 estas nia Saŭrkraŭta kaj Kiŝa Semajnfino. Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetable. Laŭ ĉi tiu principo GEJ kaj JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn de Elzaco. Jam ni promesas reception, kiu kunligos kiŝon kaj saŭrkraŭton.



Kunlaborado inter GEJ kaj JEFO

Okaze de ĉi tiu malstreĉa renkontiĝo ni povos pridiskuti niajn agadojn ambaŭflanke de la landlimoj. Komunaj temoj traktindaj koncernas organizadon de kursoj, trejnadon de novaj aktivuloj aŭ strukturadon de lokaj agadoj. Longdaŭraj kunlaboradoj povas rilati al perretaj kursoj aŭ aliaj retaĵoj, kiuj ne postulas fizikajn kunvenojn.



Germana

Die «gastronomischen Treffen» der frz. Esperanto-Jugend bieten die Gelegenheit, Frankreichs regionale

Kulturen mit kulinarischen Themen, aber auch durch Kontakte zu lokalen Verbänden, zu entdecken. Unter anderem wird uns der Verein «Handwerker der Welt» an seinen natürlichen Produkten und seiner Ethik bzgl. fairen Handels und weltweiter Solidarität bereichern. Überall sind Vereine von besonderer Wichtigkeit, um Jugendliche sensibler für ihre regionale Kultur zu machen. So werden wir bei jedem der drei Treffen im Herbst 1998 die Gelegenheit haben, eine Sprache, und somit einen Schatz im Herzen der Menschen, zu entdecken. Da wir uns jedesmal in der Nähe einer Staatsgrenze treffen werden, laden wir die neuen Esperantosprecher beider Seiten ein, die internationale Sprache hautnah mitzuerleben und viel Spaß zu haben.

Elzaca

Die gastronomische Träffa von da junga Esperantospracher (Espéranto-Jeunes) sen a Galagaheit, die

Lawesgawohnheita von unsera Regiona za entdecca, natürlich durch die Gastronomie, aber oi durch Kontakt met lokala Vereiner. Unter dana Verinigunga gebt uns Artisans du Monde die Galagaheit, sini Naturprodukt za probiara und sini Ethik von garachta Händelsmethoda za schätza, ser a gresseri Solidariät en der Walt. Eweräll spelt s' Vereinslawa a sehr wechtiigi Roll, ser die Jugend uff ehri regional Kultur ufmerksam zu mächa. So ha mer em Herbscht 1998, em Loif von drei Träffa, die Galagaheit, a Sproch, älsö der liabscht Schätz em Harz von da Litt za entdecca. Will mer jedesmol nei witt von'ra Landesgranz sen, lada mer die neja Esperanto-spracher von beida Sitta von dana Granza in, sich iis Plasier metmänder en der Internationäl Sprech za unterhält.

Kunveno de la Okcidenteŭropa Konferenco de Esperantistaj Junularoj (OKEJ)

Dum la pentekosta semajnfino (1998-05-29/06-01) kunvenis en Amsterdamo reprezentantoj de (tri el) la okcidenteŭropaj esperantaj junularoj (OKEJ). Ne nur la sinprezentantoj de la asocioj estis priparolindaj sed ankaŭ la labormetodoj por daŭra kunlaborado inter niaj asocioj. Kompreneble ni ne povis kunsidi senĉese dum tri tagoj, tial ni iomete vizitis Nederlandon. Kelkaj konkretaj projektoj rezultas el tiu kunveno.

Kompreneble ĉiu prezentis la nunan staton de sia asocio. Financoj kaj nombroj da membroj estas nur parteto de tia portreto. Sano de asocio videblas tra siaj agadoj dum la lasta jaro. Ĉefe rolas por tio la aktivuloj, kiuj ebligas ne lasi ĉiujn farendadojn sur la ŝultroj de la estraro de la asocio. Vigleco de asocio ankaŭ videblas tra siaj projektoj por la venontaj monatoj. El ĉi tiu vidpunkto la tri reprezentitaj junularoj bonfartas. Sed leviĝis la demando: "Kiel helpi la malpli fortajn movadojn de nia ĉelo?". Malfacile respondeblas sen ties ĉeesto.

Kerne de la diskutoj estis unue la dezirindaj labormetodoj por antaŭenigi daŭran kunlaboradon inter ĉiuj landaj sekcioj de OKEJ. Estis interkonsentite, ke unu kunveno dum la jaro ne sufiĉas. Ankaŭ la planitaj cirkuletoj ne povas doni bonajn rezultojn ĉar ili postulas tro da tempo por kunmeti la informojn. La plej simpla metodo estas reta dissendolisto, al kiu abonas ĉiu landa komisiito pri OKEJ-agado. Realigita kaj nun uzenda.

Ĉu eblas kunordigi niajn fortojn por sendi interesigaĵojn al someraj internaciaj kursoj (en Prago aŭ dum la IJK)? Nederlanda Esperanta Junularo (NEJ) kaj Germana Espe-

ranta Junularo (GEJ) sendas lernantojn al la IJK-aj kursoj, dum Junulara Esperanta Franca Organizo (JEFO) ne varbis por tiaj kursoj. Pro diversaj spertoj la pragaj kursoj ne ŝajnas tre allogaj. Ĉu tio evoluos ĉi-somere por instigi nin al varbado venontjare? Espereble jes laŭ la informoj senditaj far la organizantoj.

La kunorganizado de ĉelimaj semajnfinoj ŝajnas tre grava agadpunkto por kunlaboro. Ne nur la Gastronomiaj Semajnfinoj de JEFO (kaj GEJ) okazos proksime de la landlimoj. Ankaŭ ĉe NEJ, la Post-Somera Klač-Kunveno (kunlabore kun FLEJA) kaj la Printempa Renkontiĝo okazos ĉelime. Flanke de GEJ, regiona sekcio de Baden-Virtembergo (Bavelido) okazigos sian jar-kunvenon ankaŭ proksime de landlimo. Kun TAKE ni organizos Scienc-Teknikan Semajnfino en Elzaco por junaj sciencistoj laŭ la temo "Modeloj".

La reta progresiga kurso de JEFO ricevas lernantojn el diversaj landoj ĉar korektantoj de la diversaj bazaj kursoj ne precize konas la kunordigaĵojn de la du ekzistantaj progresigaj kursoj. Per aŭtomataj retserĉiloj la lernantoj ŝajne trovas pli facile la kurson de JEFO. Bezonatas internacia teamo da korektantoj por la kurso de JEFO kaj pli racia varbado por ambaŭ progresigaj kursoj (vidu la TTT-paĝon pri "Lerni esperanton" en la Virtuala Esperanto-Biblioteko <<http://www.esperanto.net/vb>>).

Multaj aliaj temoj estis ankoraŭ. Por faciligi subvencipetadon ĉe eŭropaj instancoj, estus bone disponi pri ĝisdatigata listo de

kontaktotoj (ne nur de OKEJ, fakte). Por infanoj, kiuj lernas Esperanton en bazlernejoj, certe indus "La Krokodileto" kaj ili ĝojus korespondi kun samaĝuloj. Por adoleskuloj iam aperis en Kroatio artikolo pri internacia amindumo per Esperanto. La KER-seminarioj de TEJO estas bonaj por trejniĝi pri specifaj temoj. Kaj la detaloj aperos en la protokolo.

Por la distra programo, NEJ organizis kafejunadon en Utrecht por la sabata vespero. La kafejunadon partoprenis aktivuloj, novuloj (kiuj eklernis dum la Paska Renkontiĝo) kaj usonaj gastoj, pli ol 20 homoj entute! Antaŭ retroviĝi kun nederlandaj junuloj, ni vizitis en muzeo ekspozicion pri la Paco de Munster. Ĉi tiu ekspozicio emfazis ĉefe la religian flankon de la tiam akirita libereco en Nederlando. Ni povis tion sperti ankaŭ dum la dimanĉa promenado en la urbocentro de Amsterdamo.

Per la ĵus kreita reta dissendolisto, regule fluos informoj kaj ideoj pri la subtenindaj komunaj agadoj de OKEJ. Ĉiu asocio instigos la kunordigaĵojn de ĉiuj perretaj kursoj por komencantoj sciigi al siaj lernantoj la adresojn de la du perfektigaj kursoj surbaze de "Gerda malaperis". Por la baz- kaj mezlernejoj ni decidis konigi al ili la liston kunarangita de Mauro La Torre kaj instigi ilin kontribui al la freŝa gazeto por infanoj "La Krokodileto".

Kvanto da frandumita ĉokolado restos sekreta ;-).

Alain.





Memoraĵoj pri Festo 98...



Noktaj trinkemuloj...

"Kredu min, ke mi pasigis agrablan restadon dum la 83-a Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier... Pro la organizo de Festo... la organizintojn gratulas..."

Ugo



La okcitana vespero ĉe la placo apud la kongresejo



La bona etoso ĉiam trovebla en la trinkejo



Ĉu pli manĝemuloj aŭ babilemuloj?



Kiu povus diri ke oni ne bone dormas en la amasloĝejo?

"...tiu-ĉi kongreso estis ege-ege bona por mi, eĉ tro mallonga. Dankon por ĉio..."
Estelle



Eĉ dum la matenmanĝo ĉiuj ridetas !

*"La Croatie c'était pas mal, mais Montpellier c'était vraiment génial ! ...voilà, j'ai passé d'excellentes vacances."
Rose*



La ĉefoj de la dolĉujo, ĉiunokta teejo de Festo



Suzy neniam forgesas ĉerci...



Estis agrable vespermanĝi ekstere plurfoje dum Festo



Multaj venis vespermanĝi en la liceo



La teleroj rapide malpleniĝas. La kuiristo estis aplaŭdita je la fino.

*"Somero sen Festo estus enuiga..."
Mirjam*

Spionraporto : Kiel la Germanoj restas eterne junaj ?

Saluton, kunagentoj. Parolas agento Tex02.¹ STOP.

Mi raportas hodiaŭ pri sekreta misio kiun mi komencis ĉe alia flanko de la Rejno, en tiel nomita GEJ-ujo. STOP. Mia misio estis informi pri la mistero de la eterna juneco de GEJ. STOP.

Mia sekreta raporto baziĝas ĉefe sur la observoj kaj aŭskultadoj, kiujn mi faris dum la t.n. « Aso » (unu el la malmultaj vortoj, kiujn Germanoj elparolas en nia lingvo !) ASo signifas « Aktiva Semajnfino » kaj estas unu el la plej gravaj elementoj de la iniciato ritara kiun praktikas GEJ rilate al siaj « novuloj »...

Strangaj uloj

Mem rigardu sur la foto. Vi vidas : GEJ-anoj aspektas kiel normalaj homoj. (Enigmo : ĉu vi kapablas rekonii la spioninon en la grupo ?) Sed ne lasu vin trompi. Rigardu ĝuste : ĉu nenio okulfrapas vin ?

Bonjour, co-agents secrets.

C'est l'agent Tex02 qui vous parle pour vous rapporter les premiers résultats de sa mission en Allemagne. Objet de ma mission: éclaircir le mystère de l'éternelle jeunesse des Allemands.

Mon rapport se base sur les observations faites au cours du dernier « A.So » (week-end actif), un des rites initiatiques les plus curieux de notre voisin allemand.

De drôles d'individus ?

Regardez vous-mêmes la photo. Vous voyez : les membres de GEJ ont l'air d'être des jeunes comme les autres. Devinette : Reconnaissez-vous l'espionne au sein du groupe ?



Foto : La aktivuloj dum la posttagmeza promonado

Se vi povus rigardi kun lup²vi farus la saman konstaton kiel mi : la GEJanoj havas aparte malaltan kvanton da blankaj haroj ! Jes ja ! Kun doloro mi devis akcepti mian novan sorton : troviĝi super la averaĝa aĝo de 21,4 jaroj...

Dua specifo, kiun vi rimarkus se la foto bonvolus paroli. Tiuj homoj havas tre strangan dialekton, apenaŭ komprenĉblan por tiu, kiu ne kutimas al ĝi. Estas kutimo, ke dum Asoj kaj similaj iniciataj ritoj oni parolas tiun sekretan lingvon², verŝajne por malhelpi eksterlandajn spionojojn. Sed min agenton Tex02 ili ne trompos : kiel konsciema spionino mi havas pli ol bazajn sciojn en kriptajoscienceco.

Kaj nun, karaj legantoj, atentu. Jen la granda revelo. Tiuj homoj, kiujn vi vidis sur la foto, kiuj aĝas ek de 16 jaroj, estas terure aktivemaj.

Et pourtant ces jeunes ne sont pas comme nous. A la loupe vous le constateriez : leur taux de cheveux blancs est anormalement bas ; au cours du week-end, la moyenne d'âge, mais oui, était de 21,4 ans !

Par ailleurs, ils s'expriment dans une drôle de langue... Est-ce pour déjouer les espions étrangers ? leur règle est de ne jamais parler notre langue commune pendant leurs rites initiatiques...Mais ils ne m'ont pas eue !

Et maintenant, chers lecteurs, attention. Voilà la grande révélation. Ces jeunes que vous avez vus sur la photo, ce sont de redoutables activistes !

¹ Kelkaj konas min sub la nomo « agento bw103362 », sed tiu kod-nomo jam ne plu validas. Aparte dirite, Tex02 ne parenas kun agento TexII., sed ja parenas kun Tex01 kaj Tex02bis.

² nomitan « germana »

Unua ekzemplo: ili venas de ĉie.

Kelkaj traveturis la tutan landon (de Hamburg en la nordo aŭ de Freiburg en la sudo), kelkfoje eĉ landlimojn, por nura semajnfino (unu venis el Lieĝo, du el Torino). La tuta Germanio ĉeestis ! Nura escepto: la eminenta « BerO » (Berlina Oficejo) restis al miaj akutaj okuloj tiom mistera kiom antaŭe : dum Aso oni multe parolis pri « BerO », sed aperis nek osto nek karno...

Dua ekzemplo de la eksterordinara motiveco de GEJanoj: preskaŭ ĉiuj, eĉ la plej freŝbakitaj, anoncis sian intencon organizi semajnfinan Esperantokurson en sia regiono...

Kiel diable tio eblas ?!?!?

Ni pripensu kune... Certe multaj motivitaj gejunuloj estas bona kondiĉo por allogi ankoraŭ pli. Sed kiel atingi tion ? Ĉu germanaj gejunuloj estas nature pli agemaj, aŭ ĉu ili ricevas pli bonan helpon ?

La demandon mi starigas al vi, gejunuloj kiuj legas tiun revuon. Pripensu, kion vi povus aŭ ŝatus fari por pli aktivigi, kiu helpon de JEFO vi bezonas por tio, ktp... Alparolu Emilie pri tio !



Exemple, ils viennent des quatre coins du pays (même de l'étranger!)



L'invasion de Blaubeuren par des forces convergentes venues de partout à la fois

Aucun, même parmi les plus jeunes, ne recule devant les centaines de kilomètres, parfois même les frontières à parcourir pour un week-end ! A part le très secret „Bureau de Berlin“, c'est tout le pays qui était représenté !

Deuxième exemple: presque tous, même parmi les „nouveaux“, ont annoncé leur intention d'organiser dans leur région un week-end de cours d'espéranto !

Comment diable est-ce possible ?!?!?

Réfléchissons. Qu'une forte proportion de jeunes motivés soit une bonne condition pour en attirer encore plus, c'est clair. Mais comment en arriver là ?

C'est à vous, jeunes lecteurs, que je pose la question: si on vous proposait d'être plus actifs à Jefe, que souhaiteriez-vous y faire ? Quel soutien souhaiteriez-vous recevoir de Jefe ?... Parlez-en à Emilie !

Tiom da inic.aj ritoj havas GEJ por siaj novuloj...

Jen resumo de raporto farita al la komitato de Jefe pri kelkaj bonaj ideoj de GEJ por faciligi la integriĝon de siaj novuloj. Legantoj, mi bonvenigas viajn reagojn : ĉu Jefe imitu GEJ ?

- Gej havas strukturon laŭ komisionoj, kiuj regule rotacias, kaj oni nature prizorgas novajn aktivulojn kiuj ekprenas postenon. Mi intervjuis Brigitte, 16 jara, kompreneble ĉeestanta A.S kaj respondeca pri la distra programo de IS 98-99:

«La komisionanoj de KKRen estas ege aktivaj. Dum la 3 unuaj monatoj de 1998 mi jam ricevis ĉirkaŭ 300 retmesaĝojn nur de KKRen. Estas por mi tute nova, sed superplezura agado!»

- La aktivaj Semajnfinoj, kiuj okazas trifoje jare, venigas novulojn kaj nenovulojn en tre simpatia kaj aktiva etoso. La cerbumado forte orientiĝas laŭ la deziroj de la junuloj, kun unu ĉefa demando: kiel GEJ povas helpi vin realigi viajn projektojn ?
- Aliaj servoj kaj ideoj:

Lokaj grupoj ricevas ne nur financan, sed ankaŭ juran subtenon GEJ (ekz. Pri la oficialaj paŝoj farendaj por ricevi publikan financan helpon) ; cetere GEJ disponigas al ili varbilojn kaj afiŝojn.

Por novuloj kiuj volas partopreni internaciajn aranĝojn eksterlande, Gej subvencias la vojaĝkoston (tion ili povas fari, ĉar ili ricevas subtenon de la ministerio pri junularo ĝuste por tiu celo). Gej ankaŭ inventis „aranĝo-tutorojn“ (unu tutoro por ĉiu aranĝo), kiuj solvas problemojn kiel «mi ne scias kiel plenigi la aliĝilon» aŭ «mi ne volas veturi sole ĝis Italio»...

- Helpe al varbantoj:

Por junuloj kiuj volas varbi, GEJ disponigas modelon de gazetartikolo, kaj por tiuj kiuj rekrutas novajn membrojn, GEJ donacas premiojn (5-10 DM).

Por faciligi la memstarecon de la novuloj, aperis la ideo de «servokajereto» (ankaŭ oni povus nomi ĝin servo-ĉekaro), en kiu oni povus trovi ĉion, kion oni bezonas por aktivigi, de la listo de necesaj kontaktoj ĝis la kalendaro de aranĝoj (kun indiko de la tutoroj), inkluzive plenegeblan deklaron de simpatio, mendilon de afiŝoj kaj aliĝilon al pasporta servo: legantoj, bona novaĵo: baldaŭ tio ekzistos ankaŭ en JEFO!

Pripensu ankaŭ vi kaj aŭdigu vin !

Via Agento Tex02 (alias Magali), komitatano pri translima spionado en Germanio.



"Pilkiĝu" vian esperanton !



Okaze de la monda ĉampioneco de piedpilko en Francio de la 10a de junio ĝis la 12a de julio, fininginta per la venko de la franca teamo, kiu kaptis la mondan trofeon por la unua fojo de ĝia historio, estis ĉirkaŭ la maĉoj, iuj distraĵoj, organizitaj aŭ improvizataj de la diversaj sub-tenantoj. Tiuj distraĵoj estis momentoj, dum kiuj eblis renkonti homojn el la tuta mondo.

Jam en junio, la vetero, eble viktimo de iu interna konflikto inter suno kaj pluvo, ne sukcesis oferti al ni ferian parfumon, sed la okuloj de la tuta mondo ekhaltis sur la verdaj terenoj de Francio, por fordoni sin al gusto de la pilko, kiu saltis virtuoze inter la piedoj de 704 aktoroj, selektitaj zorgeme kaj veniĝantaj okaze de la futbala kunveno. Kiu kredos tion ?

Tiel, Francio komencis iun karieron de giganta teatro, per 10 scenejoj dispartigitaj en francaj urboj, sed tiu paĝo ne temas pri futbalo, ĉar evidente, multaj sentas iun tedon eĉ iun nervozigon, kiam «pilko» estas aŭdata, kaj aliaj antaŭjuĝas la ludon, laŭ la bildo de la vira sesio, preskaŭ porka, brutaj; unuvorte animala, en la manĝsalono. Nekontesteble, kiam la edzo, paralizata de la ekrano, respondas pri tiu stulteta frazo al iu ajn demando de sia edzino: «Jes, kara mia, se vi volas!» Mi konsentas ke estas senkuraĝiga. Trankviliĝu, ne temas pri futbalo; oni nur devas foriri, lanĉi siajn okulojn en la stratojn por senti la varman etoson de la homplena avenuo.

Kaj kiam oni pensas iome pri la rezulto de tio kaj pri la konsekvencoj, la venko de Francio, la unua venko en ĝia historio, hejme, antaŭ la samlandanoj, pli ol unu miliono da homoj sur la ĉefa avenuo de Parizo, la trikoloraj flagoj, kiuj ekkreskis ĉie. Ne, ne, tio ne estas futbalo, estas magio. Kaj kiu diras la malon, li malaperigu sian malsincerecon aŭ

li estas senespere stulta.

Sed, riskante rediron, tiu paĝo ne temas pri futbalo, trankviliĝu leganto, nur estos elvokata tio, kio okazis post la maĉoj, ĉirkaŭ la stadionoj. Mi ne interesiĝos nun pri la statistikoj, la tekniko, mi nur respondos al la demandoj: -Kio post la maĉoj? En la stratoj? En la trinkejoj? Kaj la respondo povas aspekti tiel:



Parizo, 16a de Junio, posttagmeze. Mia menso estas jam okupata de la nuna futbala afero. La obsedo pri la maĉoj. Kaj ĉiĉespere, je la naŭa horo, Brazilo ludos kontraŭ Maroko en Nantes. Nun mi estas kun amiko kaj amikino, ĉe la kafejo «Contrescarpe» en Parizo, precize en la same nomiĝata kvartalo de la ĉefurbo. Miaj okuloj estas gluitaj al la ekrano de la televido. Nur la ŝerco de iu amiko povas malgluigi ilin. La demando venas: «-Ĉu ni iras al Nantes-on?». La okuloj de miaj amikoj respondas antaŭ ili; tion respondas: «-Vi estas freneza!». Mi tuj diras: «-Mi ne estas freneza! Ni foriras nun, ni festegas kaj ni revenos hejmen! Ĉu?». La okuloj de miaj amikoj renkontas sin, iu pripensado. Tiam, respondas iliaj ridetoj antaŭ ili. Ili konsentas. Mi leviĝas. «-Ek! Al Nantes!». Post kelkaj horoj aŭte, aŭskultinte la maĉon per la radio, ni finfine estas en Nantes. Ni lasas la veturilon ie, kaj ni serĉas la urbocentron. La «batucadas»^{*} resonas. Post iu momenta atendo antaŭ la katedralo, iun dancantan vicon naskas la homamaso. Ĝi iĝas iu

longa serpento. Ĝi rampas, skuita de la taktoj de «samba» improvizataj de ĝiaj eroj. La rondo en la centraj stratoj daŭras dum horoj. Eble du centoj da homoj, unuiĝataj por festegi, rondiras en la urbocentro. Varma, amika, dia etoso. Estas alia mondo, ĉiĉespere mi ne povas imagi, ke ankaŭ tiel povas aspekti Francio, sed videble, ĝi estas tiel. Mirinda. Finfine, post kelkaj horoj, Nantes malpleniĝas. Kaj ni? Ni reiros al la aŭto kaj simple forveturas al Parizo. Nia menso relegas la noktan filmon. Iu senĉesa filmo. Kiam la tagiĝo alvenas, ĝi komprenigas al ni: «Do, geknaboj, la nokto estas finita, la vivo rekomencas kiel antaŭe!» Tiam sur la ekrano aperas la vorton «FINO». Tamen, la filmo estas surbendigita, kaj estos revidebla laŭplaĉe. La sama sento de iu fino de renkontiĝo: iomete da nostalgio kaj da plezuro pro esti partopreninto de tia festo.

Imagu tiajn festojn, tiom da homoj en la stratoj, eĉ tion kunportis la ĉampioneco. Certe, ne povis esti entute bela spektaklo ĉie, estis ankaŭ sovaĝiĝitaj situacioj, koloritaj per sango, sed malfeliĉe estis ĉiutempe tiuj fiuloj, kies plezuro estas ruinigi la feliĉon de la aliaj, kion oni povas diri? Tiuj problemoj ekzistos ĉiam, kaj malhavi tiujn festojn estus stulta eraro, povi renkonti homojn de ĉiuj landoj, provi amuziĝi kun ili, komuniki ĝojon estas ankaŭ esperantistaj celoj, tial ekzistas tiu artikolo.

^{*}batucadas: Tamburetoj en la portugala; tipaj brazilaj tamburetoj.



Veszko

Kalendaro

OKTOBRO

02 - 04 octobre

—> Francio (Diebolsheim en Alsace)

◆ 7e week-end gastronomique organisé par JEFO sur le thème «quiche-choucroute». Préparation des repas, balades, pratique de l'espéranto,...

Inf : Pascal Lécaille

ou jefo@esperanto.org

03 octobre

—> Tuta mondo

◆ Journée de l'espéranto (Tradicia «Ago-Tago»)

Inf : UEA, Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam

03 - 10 octobre

—> Hispanio (Calafell, Tarragona)

◆ 6e Semaine Internationale d'Espéranto Culturelle et Touristique

Inf : Hispana Fervojista Esperantista Asocio, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona iserrano@oc6.es

14 - 21 octobre

—> Nederlando (sud du pays)

◆ Croisière dans le sud des Pays-Bas.


Inf : Jan A. Hanse, Rothenbachpark 44, NL-6063 NM Vlodrop

16 - 18 octobre

—> Belgio (Mol)

◆ Post Somera Klaŝ-Kunveno : ragots, potins et Cie sur les rencontres et congrès de l'été juste passé !!!

Inf : Ingeborg van Dijk, Hooigracht 13, NL-2312 KM Leiden nej@dds.nl



21 - 25 octobre

—> Francio (Ariège et près de Toulouse)

◆ 8e pré-week-end et week-end gastronomique organisé par JEFO, sur le thème du pain et du cassoulet

Inf : Pascal Lécaille

ou jefo@esperanto.org

25 - 01 octobre-novembre

—> Francio (Lavelanet -Ariège)

◆ 10e stage de chant choral en E°

Inf : Jorgos, 7 rue de l'Espéranto, 09120 St-Félix-de-Rieutort

Tél : 05 61 60 86 83

27 - 31 octobre

—> Francio (Bouresse, près de Poitiers)

◆ Semaine sur le thème du Japon

Inf : Kvinpetalo, Rue du Lavoir, 86410 Bouresse

Tél : 05 49 42 80 74

30 - 03 octobre-novembre

—> Francio (Bouresse)

◆ Semaine de pratique de la langue

Inf : Kvinpetalo (voir ci-dessus)

30 - 05 octobre-novembre

—> Usono (San Francisco)

◆ 8e congrès international d'espéranto

Inf : Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530

LusiHarmon@aol.com

NOVEMBRO

05 - 12 novembre

—> Hawaïi (Honolulu)

◆ Post-congrès du congrès international d'espéranto (San Francisco -30oct - 05nov)

Inf : voir ci-dessus

DECEMBRO

10 - 15 décembre

—> Francio (Bouresse)

◆ De Zamenhof à Privat en passant par Gandhi, Lanti, R. Rolland.

Inf : Centre Culturel Espéranto «La Kvinpetalo» (voir ci-dessus)

23 - 03 décembre-janvier

—> Bulgario (Karlovo)

◆ Vacances de fin d'année «Karlova Vintro», à l'occasion du nouvel an.

Inf : Esperinform, B.Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo

27 - 03 décembre-janvier

—> Germanio (Kassel)

◆ 42a Internacia Seminario (IS) sur le thème «Dépendance - Faits, Conséquences, Solutions» (Dépendance non seulement par rapport à l'alcool ou à la drogue, mais aussi psychique, économique,...)

Bulletin d'inscription au centre de ce JI.

JANVIER

22 - 24 janvier

—> Francio (près de Paris)

◆ 9e week-end gastronomique organisé par JEFO sur le thème des «douceurs» (pour célébrer la fin du Ramadan, la cuisine orientale sera à l'honneur avec miel, amandes et épices colorées, couscous, etc)

Inf : Pascal Lécaille





Korespondpetoj



LEE Hyun Kyung

Jugong A.P.T. 424-312 Gaepodong,
Kangnamgu (135-240)
Seulo, Koreio
luna22@hanimail.com

Mi estas fraŭlino 24-jara. Mi lernas Esperanton, kaj la francan lingvon.
Interesoj: komputilaj ludoj, internet, kanto.

Mi serĉas mondajn korespondantojn. Eble mi iros al Francio en la estonteco. Mi ŝatas ret-poŝton, sed mi TRE ŝatas paper-poŝton.

Natia Randolph

Louisville
Kentuckio, Usono
Ret-adreso: Natia436@aol.com

Mi estas fraŭlino 19-jara, Esperanta komencanto.
Interesoj: literaturo, arto, lingvistiko, aliaj kulturoj.
Louisville estas granda urbego en la sudo de Usono.

Jurij ŜEVČUK

Gagarin-str., 57-19, u. Peĉora,
Respubliko de Komio,
Rusio, 169700
shevchuk@north.parma.ru

25-jara junulo, handikapulo de bubaĝo, ne iranta, havanta historian klerecon, Esperanto-kapabloj: inter meza kaj bona.

Interesoj: historio entute kaj tiu de esperanto-movado ĝenerale, aktivado en e-movado, interlingvistiko: ido, astronomio, NIFO, futbalo, komputiloj, handikapuloj.

Preferas la ret-korespondadon, sed oni povas leteri al mi paper-poŝte (en tiu okazo sendu 1 IRK). Mi petas reeti tiujn, kiuj havas iajn materialojn pri la temo "Esperanto kaj militoj", kaj junulinojn 18-25-jaraĝajn (precipe el la Suda hemisfero) por korespondadi rete en esperanto, ido kaj la rusa.

Ronnie BROWN

Ellisville,
Missouri, Usono
ronnyquest@tetrinet.net

Mi estas fraŭlo 27-jara. Komencanta esperantisto.

Interesoj: muziko, motorcikloj, komputiloj, liber-aera agado, kaj Esperanto.
Ellisville estas antaŭurbo de urbo Saint Louis.

Okcidentaj Afrikalandoj, kiuj deziras havi korespondantojn tra la mondo paper-poŝte: (sendita de Drissa Flayoro DIAKITE)

S-ro ADJE Adjevi

BP 13169 Lomé, Togo
S-ro ANOUMOU Adjété
BP 61266 Lomé, Togo
S-ro ADJE Koffi
BP 6062 Lomé, Togo
S-ro YOVO Guy p/a SOKPO Fofu BP 61230 Lomé, Togo
S-ro LAWSON Teyi Pierre BP 60908 Lomé, Togo
S-ro AMOUZOUVI Koffi Theophile BP 20563 Lomé, Togo
S-ro AFANDINA Kokou Timothé BP 61226 Lomé, Togo
S-ro TETE-BADU Nyinèvi BP 61266 Lomé, Togo
S-ro YOVO Bruno p/a SOKPO Fofu BP 61230 Lomé, Togo



Joi Fiŝer

Sanantonio, Teksaso
Usono
xWaver@yahoo.com
TTT-adreso: http://members.xoom.com/xWaver/
(Esperanto traduko proksimiĝas)

Mi estas 18-jara Usonano. Mi parolas anglan, hispanan, kaj esperanton. Antaŭe mi loĝis en Meksiko Urbego. Mi estas universitata studento, desegnas TTT-paĝojn. Mi estas majstro de Esperanto babilado en ICQ. (&Esperanto) kaj xWaverBistro (ankaŭ ICQ), grupo de temoj politikaj kaj aktualaj.

Laura BERTOLO

via Steffani 6
31033 Castelfranco Veneto TV
ITALY
laura@chim03.chin.unipd.it

Mi estas 20-jara virino, komencanta.

MARDI Minangsari

Jl. Kp. Melayu Kecil 5 Rt007/011 No.20
Jakarta 12840, INDONESIA
mardim@cbn.net.id

Mi nomiĝas MARDI Minangsari, sed vi povas diri Minang aŭ Boyo. Mi estas 23-jara fraŭlino. Mi volas lerni Esperanton. Mi ŝatas subĉielan vivon, liber-arean. Mi ŝatas piedvagi, flosadon, naĝadon, subnaĝadon. Mi ankaŭ ŝatas sportojn, precipe piedpilkon. Miaj favoritaj teamoj estas Liverpool, Juventus and Real de Madrid.

Drissa Flayoro DIAKITE

PGRN BP 2382
Bamako, MALI
Tel 22 36 03/22 80 68
Assetou.Cisse@malinet.ml

Mi estas tajpisto en PGRN Projekto financa de la Tutmonda Banko por Malio. Mi estas edziĝinta sen infano. Mi volas daŭrigi la lernadon de nia lingvo. Mi estas komencanto kaj mi povas bone legi kaj skribi leterojn kun helpo de vortaro. Mi volas havi korespondantojn tra la mondo. Mi volas korespondi unue retpoŝte, kaj poste paper-poŝte, por interŝanĝi bildkartojn.

Jim HENRY

Georgia, Usono
Jim.Henry@pobox.com

Mi estas 24-jara fraŭlo. Min interesas la scienc-fikcio, luda matematiko (precipe ŝap-scienco, nombro-teorio, frakciumoj), historio, komputil-scienco (programado estos mia profesio), lingvo-scienco, farado de ret-disendeblaj libroj (kiel Project Gutenberg, Association des Bibliophiles Universels, ktp), kaj aliaj. Mi loĝas enarbare proksime al Stockbridge, Georgia, Usono, kiu estas proksima de Atlanta, ŝtat-ĉefurbo.

Fabio MEDEIROS


Astro@novaera.com.br

Mi estas Fabio, viro/ havas 16 jarojn, mi estas lernanto komencanto en esperanto lingvo. Mi laboras nun en la McDonald's fast food, antaŭ 1997. Mi estis en 1996 en Germanio sed mi konas pli malbone la germanan lingvon. Mi iros fine de tiu jaro al Belgio kaj dezirus ankaŭ koni aliajn landojn de Eŭropo. Mi deziras kontaktojn kun samideanoj de Eŭropo, precipe en Francio.


ENIGMO

(sendita de Damien)

Regulo : Vi devas korespondigi ĉiun literon al numero por plifaciligi la aferon.



1. Bela multkoloraĵo, ido de suno kaj pluvo
2. Iras tien-ĉi
3. Grupego da homoj aŭ aĵoj
4. Ĉirkaŭcerbaj ostoj
5. Vin kaj min
6. Plej grava numero en adreso
7. Ne farita malbonon ajn
8. Homama
9. Plezure rigardataj pro aspekto
10. Eksciaj travivaĵoj dum la senlabora tempo
11. Forte teni en la manoj
12. Fluaĵo
13. Tiaj, kiaj floroj aŭ parfumoj
14. Ekkonfuzegaĉeja pramonumento
15. Biblia nomo de Dio
16. Al amo de Dio !
17. Vira subvestaĵo



Viaj kontaktoj ĉe JEFO / Vos contacts chez Espéranto-Jeunes


Same kiel por ĉiuj asocioj, la komitato de JEFO elektas estraron. La lokajn kontaktojn tenas niaj regionaj kunordigantoj (vidu ĉi-suban mapon). Aliaj aktivuloj havas rolon komisiitan de la komitato. Tiu ĉi paĝo prezentas la aktivulojn elektitajn dum la ĝenerala asembleo de 1998-04-18/19.

Comme pour toutes les associations, le conseil d'administration de JEFO choisit un bureau. Les contacts locaux sont assurés par nos coordinateurs régionaux (voir la carte ci-dessous). D'autres actifs ont un rôle délégué par le conseil d'administration. Cette page présente les actifs élus par l'assemblée générale de 1998-04-18/19.

Sidejo / Siège social		
Espéranto-Jeunes		jefo@esperanto.org http://ttt.esperanto.org/jefo
Estraro / Bureau		
Bruno Flochon (prezidanto/président)		BFlochon@esperanto.org
Olivier Moreau (kasisto/trésorier)		OMoreau@esperanto.org
Pascal Lécaille (helpkasisto/trésorier adjoint) (CR Rhône-Alpes)		PLecaill@esperanto.org
Cédric Forgeau (sekretario/secrétaire)		CForgeau@esperanto.org
Komitato / Conseil d'administration		
Flavie Audibert		
Yves Bachimont (CR Normandie)		YBachimont@esperanto.org
Philippe Bérizzi		PBerizzi@esperanto.org
Vincent Charlot (partis politiques)		VCharlot@esperanto.org
Ludivine Delnatte (rédactrice JJ)		
Alain Fagot (rencontres gastronomiques)		AFagot@esperanto.org
Catherine Giangrossi (enfants et Krokodileto)		CGiangrossi@esperanto.org
David Hromada		DHromada@esperanto.org
Émilie Joly (adolescents)		EJoly@esperanto.org
Didier Loison (CR Bourgogne/Franche-Comté)		DLoison@esperanto.org
Sylvie Roques (SEREG)		SRoques@esperanto.org

Karine Texier (CR Bretagne)		KTexier@esperanto.org
Magali Texier (subventions) (relations franco-allemandes)		MTexier@esperanto.org
Laurent Vignaud (CR Pays de la Loire)		LVignaud@esperanto.org
Aliaj kunordigantoj / Autres coordinateurs		
Marc Bavant (cours par Internet et site)		MBavant@esperanto.org
Bruno Ferré (CR Aquitaine)		BFerre@esperanto.org
Erwin Kretz (CR Alsace/Lorraine)		
Vincent Pacheu-Bourrely (CR PACA)		mapacheu@minitel.net

Mallongigoj / Abréviations				
t = Téléphone	f = Fax	[r] = Répondeur	m = Mobile	CR = Coordinateur Régional



Gastronomiaj Semajnfinoj


SAŬRKRAŬTA
kaj **KIŜA** *Semajnfino*

SAŬRKRAŬTA


kaj **KIŜA** *Semajnfino*

2-4 oktobro 98 • Diebolsheim • Elzaco

G EJ kaj JEFO kunorganizas la unuan franc-germanan gastronomian semajnfino. Estas tre modesta kromefiko de la kunlaborado kadre de OKEJ sed tiam ni rekte ĝuos la fruktojn de niaj strebadoj. Elzaco estas aparte grava regiono. Ĝi estis preteksto por pluraj militoj kaj nun ĝi iĝas preteksto por amikiĝo.



De la 2a ĝis la 4a de oktobro 1998 estas nia Saŭrkraŭta kaj Kiŝa Semajnfino. Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetable. Laŭ ĉi tiu principo GEJ kaj JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn de Elzaco. Jam ni promesas recep-



MUNĴETADA
Semajnfino

.....
ton, kiu kunligos kiŝon kaj saŭrkraŭton.
Kunlaborado inter GEJ kaj JEFO

Okaze de ĉi tiu malstreĉa renkontiĝo ni povos pridiskuti niajn agadojn ambaŭflanke de la landlimoj. Komunaj temoj traktindaj koncernas organizadon de kursoj, trejnadon de novaj aktivuloj aŭ strukturadon de lokaj agadoj. Longdaŭraj kunlaboradoj povas rilati al perretaj kursoj aŭ aliaj retaj, kiuj ne postulas fizikajn kunvenojn.



MUNĴETADA

Semajnfino

23-25 oktobro • Gaillac-Toulzou • apud Toulouse


J EFO denove okazigas Gastronomian Semajnfino en Okcitanio. Post la Fiŝa Semajnfino en marto, estas nun de la 23a ĝis la 25a de oktobro la Munĵetada Semajnfino. Tio estos ripoziga punkto de elstara Esperanto-semajno. Post semajno plena je esperantaj okazaĵoj, vi ĝuos ripozigan Gastronomian Semajnfino, dum kiu vi povos ĝui okcitanian gastronomian kulturon.

JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al Okcitanio. Proksime de Katalunio kaj Eŭskio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksterfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.



La semajnfino

kiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la



renkontiĝo.

Post la Universala Kongreso...

Estos okazo diskuti niajn planojn por daŭrigo de niaj agadoj por diskonigo de Esperanto en Francio. Dum okazigo de la Munĵetada Semajnfino, ni ankaŭ pridiskutos la agadojn de JEFO dum la venontaj jaroj.

Etoso

Tiaj renkontiĝoj estas specifaĵo de la esperanto-junularo en Francio: internacia etoso kun iom-post-ioma enkonduko al uzado de Esperanto, samtempe gustumante frandaĵojn.

Kuirgvidado

Okazos kiel kutime dum ĉiuj gastronomiaj semajnfinoj trejnado al gvidado de kuirado. Tiuj, kiuj deziros gvidi la preparadon de la pladoj, ricevos trejnadon por la tasko de ĉefkuiranto. Tiel ĉi ajn povos lerni kiel doni indikojn kaj kunordigi plurajn kunkuirantojn.

Nepre sendu rapide vian aliĝon al Jefe • Se vi ne havas aliĝilon, demandu !